# Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 19-an de Februaro 2024

**Ĉeestantoj (fizike):** Jehoŝua Tilleman, Avigail Meŝulam, Inbar Mor, Amri Wandel; (**zome):** Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi.

***Protokolo** de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

***La Estraro gratulas al Ŝlomo, okaze de ties unu- kaj duon-jubilea naskiĝtago!***

## 1. Raportoj

a) **Gabi** ĉeestis la naskiĝtagan festenon de Ŝlomo en ties kibuco, Givat-Ĥajim-Iĥud, kiel la sola reprezentanto de ELI. Interalie Ŝlomo rakontis al la publiko pri la Internacia Lingvo.
b) **Dror** pripagis la renovigon de nia retloko en la servilo; petas la repagon de la elspezo. La 8-an de Novembro nia retpaĝo estis atakita far retpiratoj (ili volis ŝanĝi unu el niaj dosieroj), sed la servilo blokis la atakon.
c) **Amri** komencis novan ciklon de "Nicocot", kun ĉ. 20 gelernantoj – ĉi-foje ne pri Esperanto, sed pri astrofiziko.

## 2. La Dratverejo (Amri)

**Amri:** la luanto apenaŭ sukcesas pagi la luprezon. Pere de Lior Hass li petis rabaton kaj ni akceptis – 3,500 NIS anstataŭ 3,700 por du monatoj. Siaflanke Lior Hass ne estis preta rabatigi ankaŭ nin, kaj tiel lia kurtaĝo proporcie plialtiĝis (pli ol 7%), pravigante tion per diversaj ekzemploj. **Propono**: ni plilongigu la rabaton por 2 pliaj monatoj (Januaro k Februaro), kondiĉe ke ekde la 1-a de Marto la luprezo realtiĝu laŭ la kontrakto. **Decido**: ***unuanime akceptita***. Amri avizos rete al Lior Haas.

## 3. Luigo de la Oficejo (Amri)

**Amri**: post la reklamo pri nia malaltigita prezo aperis interesitoj. Venis grupo de 4 homoj, kiuj volis kune lui nian etan oficejon, kun kelkaj petoj de ni, interalie uzi la servojn, je kiuj rajtas luanto, ne kiel grupo – sed **aparte** por kvar individuoj. La kontrakto jam estis preta por subskribo – sed Erez, la administranto de la etaĝo ekaŭdis kaj furiozis. Li kontraŭis kaj la malaltan luprezon, kaj ke ili ne luas de li, kaj la provon de la kvaropo uzi la lokajn sport-servojn. Li prezentis kontraŭan proponon: lui nian oficejon kontraŭ 100 pliaj sikloj kaj dedukti nian monatan administran kotizon – tion kondiĉe, ke ni nuligos la malpermeson en la kontrakto pri plu-luigo. Kunlabore kun **Ŝlomo** li klopodos solvi la problemon de VAT.

## 4. La Israela Kongreso –11/14 de Aprilo 2024 (Jehoŝua,Amri)

**Dror**: aperis aliĝilo en nia retpaĝo, sed aliĝis nur 3 eksterlandanoj kaj israelano. **Jehoŝua**: ni devas atentigi la membraron, ke ili devas registriĝi, ne nur telefone. **Eran** bezonas nur 4-litan ĉambron. **Gabi**: ĉar estas eraroj en la retpaĝo – mi kopios la bildojn de la paĝoj, kaj sendos al

2/…

**Dror** por korekto. **Avigail** pagis sian ŝuldon de la antaŭaj eventoj, kaj pretas partopreni la kongreson en dormoĉambro. Same tranoktos **Inbar**, kiu petis rabaton pro sia kontribuo por la arta programo. **Jehoŝua**: pliaj kontribuoj estas bezonataj! **Mikaelo** pretas aldoni – sed li deziras ricevi la plenan bildon de la aranĝoj. **Eran** pretas aldoni. **Amri**: 5 eksterlandanoj jam certigis sian partoprenon en la IK kaj la AK, 2 aliaj eble konsideros. La bezonataj ĉambroj estas jam rezervitaj. Detala programo troveblas en la retpaĝo.

## 5. ***Israela Esperantisto* n-ro 177** (Mikaelo)

**Mikaelo**: Mi havas multe da materialo kaj petis de **Amri** plivastigi la bultenon de 28 al 32 paĝoj. Tio ĉi ne pezigos la kajerojn preter la poŝta pez-kategorio dum la sendado. ***Unuanime aprobita***. Postnelonge la bulteno estos sendita al **Gabi** por provlegado (la unua versio jam estis korektita).

## 6. **Magazeno por la libroj de ELI** (Ŝlomo)

**Ŝlomo** proponas aĉeti aŭ lui plian ejon en nia etaĝo en Alon-Turo por la libroj. **Jehoŝua**: Ĉu nia kapitalo permesas tion? **Ŝlomo**: ni povas prunti. **Jehoŝua**: nia sperto, kiel asocio, prunti ĉe bankoj – ne estis bona. **Ŝlomo**: la kibuco eble pruntos al mi, kaj ELI repagos al ĝi. **Jehoŝua**: ĉu la eta oficejo sufiĉas por nia libraro, eĉ por sidi tie? Mi vidis la kvanton en la kelo de **Doron**. Kaj kiu aranĝos ilin? **Gabi**: sur bretoj ĉirkaŭ la muroj ĝis la plafono – jes. Oni povas sidi en la mezo. Pli bona solvo ol en la kelo nun. **Jehoŝua**: Ĉu ekzistas ne-uzata, sed luebla ĉambro en la kibuco? **Ŝlomo**: kontenero ne estas permesata, eĉ punebla, sed pri tia ĉambro mi demandos la respondeculon.

**La venonta kunsido**: lunde, la 18-an de Marto 2024, je la 20:00

*Protokolis: **Gabi Zeevi***